

Rudolf Alexander Schröder,
An die Nelke

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

...

²aŭ:
tamen ŝvebas vi leĝere
kiel bela papili’.

Rudolf Alexander Schröder,
Al la dianto
tradukita de Manfredo Ratislavo

Ho dianto, rozfratin’,
vi stel-cirklo ronda, vere
firme kaj eĉ pli fiere
vi ja scias fermi vin.

Vian koron montras vi;
sed du flamoj ruliĝantaj,
konvulsie langumantaj
arde brulas super ĝi.

Spic-odoron, fajron vi
portas kvazaŭ el-infere,
tamen ŝvebas en-aere²
kiel flirta papili’.

Floras, kara amikin’,
ĉiam ĉe l’ fenestro bele,
akompanas vi fidele
tra la tuta jaro min.

...

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas RUDOLF ALEXANDER SCHRÖDER (*1878-01-26 – †1962-08-22).

Arg-781-1564 (2013-01-19 14:03:15)

Pri la poeto vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Rudolf_Alexander_Schr%C3%B6der.

Traduko de la Germana poemo “An die Nelke” de RUDOLF ALEXANDER SCHRÖDER (*1878-01-26 – †1962-08-22) *en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO (*Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04*).

Arg-781-1565 (2013-01-19 13:52:21)